# Instruistoj de la Jaro

## Iniciato okaze de la 75-jariĝa jubileo de ILEI

### en la Zamenhof-Tago 2024

ILEI kun subteno de TEJO invitas ĉiujn esperantistojn proponi kandidatojn por du kategorioj:

1. "Juna Instruisto de la Jaro" (35 jarojn aĝa aŭ malpli, t.e. TEJO-aĝo)

2. "Instruisto de la Jaro" (pli ol 35 jarojn aĝa)

**Kandidatoj plejeble havu:**

- Regulecon en Esperanto-instruado
- Aktivajn instrumetodojn
- Novigajn alirojn al instruado
- Historian kaj kulturan konigadon de Esperanto
- Internacian kunlaboradon
- Kreemon de instrumaterialoj
- Longdaŭrajn pozitivajn rezultojn

**Al la gajnintoj estos donacitaj:**

- Atestilo
- Senpaga aliĝo al TEJO-kongreso (IJK) kaj ILEI-Kongreso de la koncerna jaro
- Senpaga membriĝo en TEJO kaj ILEI kun retaj versioj de revuoj Kontakto kaj IPR en la koncerna jaro

- Unu libro flanke de TEJO por la “Juna esperantisto de la jaro”

- Unu libro flanke de ILEI por la “Esperantisto de la jaro”

**Por kandidatiĝo aŭ kandidatigo bv. sendi jenajn informojn pri la kandidato al ilei.prezidanto@gmail.com:**

- Personan prezenton

- Konkretajn atingojn

- Kontaktinformojn

- Rekomendojn (se eble)

**Gravaj datoj:**

Limdato por kandidatiĝo/kandidatigo: fino de marto 2025

Sciigo al la gajnintoj pri ilia elektiĝo: fino de aprilo 2025

Publika anonco pri la gajnintoj: ILEI-kongreso en 2025

Ni atendas viajn kandidatiĝojn/kandidatigojn!

***ILEI-estraro***
***Zamenhofan Tagon 2024***